Nederlanda Esperanto-Junularo

Statuten (officiële versie) 1
Statuto (esperanta traduko) 5
Ĝenerala Regularo (oficiala versio) 8
Financa Regularo (oficiala versio) 10

Statuten

Naam, zetel en duur

Artikel 1

1. De naam van de vereniging luidt: « Nederlandse Esperanto-Jongeren », ofwel in het Esperanto « Nederlanda Esperanto-Junularo » in beide gevallen af te korten tot « NEJ ».
2. De vereniging is gevestigd te Amsterdam.
3. De vereniging is de Nederlandse afdeling van Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
4. Oorspronkelijk is de vereniging op negen januari negentienhonderd vijfenzestig opgericht voor de duur van negenentwintig jaar en elf maanden. De vereniging is erkend door goedkeuring van haar statuten bij Koninklijk Besluit van negen juni negentienhonderd zesenzeventig, nummer 58. Vanaf de inwerkingtreding van deze statutenwijziging is de vereniging aangegaan voor onbepaalde tijd.
5. De officiële talen van de vereniging zijn de internationale taal Esperanto en het Nederlands.

Doel en middelen

Artikel 2

De vereniging stelt zich ten doel:

a. het Esperanto te verbreiden, in het bijzonder onder jongeren in Nederland;
b. jongeren in Nederland bewust te maken van het talenprobleem in de wereld.

Artikel 3

De vereniging tracht haar doel langs rechtmatige weg te bereiken door:

a. het organiseren van bijeenkomsten voor jonge Nederlandse en buitenlandse Esperantisten, rond thema's van maatschappelijk en cultureel belang;
b. jongeren in Nederland te informeren over het talenprobleem in de wereld en in het bijzonder over de mogelijkheden van Esperanto en de Esperantobeweging;
c. het verzorgen van Esperanto-onderricht;
d. het samenwerken met andere Esperanto-organisaties in nationaal en internationaal verband;
e. het onderhouden van contacten met andere internationaal georiënteerde jongerenorganisaties in Nederland;
f. het uitgeven van een verenigingsblad;
g. het aanwenden van alle andere doelmatige middelen.

Lidmaatschap

Artikel 4

1. Als lid van de vereniging kan een ieder toegelaten worden die de leeftijd van dertig jaar nog niet heeft bereikt en die zich bij het bestuur of bij een door het bestuur aangewezen persoon heeft aangemeld om lid te worden.
2. Bestuursleden die dertig jaar of ouder zijn, worden ook als lid aangemerkt.
3. Bij de aanmelding als lid dienen ten minste naam, adres en geboortedatum te worden gemeld.

4. Na aanmelding wordt de kandidaat door of namens het bestuur zo spoedig mogelijk meegedeeld of hij als lid is toegelaten. Als de kandidaat is toegelaten, ontvangt hij een exemplaar van de statuten en de reglementen. Als de kandidaat niet is toegelaten kan de ledenvergadering alsnog tot toelating besluiten.
5. De ledenvergadering kan ereleden benoemen. Ereleden die de leeftijdsgrens zoals vermeld in artikel 4 lid 1 zijn gepasseerd en die tevens geen bestuurslid zijn hebben geen stemrecht.

Artikel 5

De leden onderwerpen zich aan de statuten, reglementen en besluiten van de vereniging en zijn verplicht tot het betalen van een jaarlijkse contributie.

Artikel 6

1. Het lidmaatschap eindigt:
   a. door overlijden;
   b. door aan het bestuur schriftelijk te kennen te geven het lidmaatschap te willen beëindigen. In dat geval geldt geen opzegtermijn;
   c. door opzegging namens de vereniging. In dat geval geldt eveneens geen opzegtermijn;
   d. door ontzetting.
2. Wanneer het lidmaatschap in de loop van een boekjaar eindigt, blijft toch de contributie voor het gehele boekjaar verschuldigd.

Artikel 7

Opzegging van het lidmaatschap namens de vereniging geschiedt schriftelijk door het bestuur in de navolgende gevallen:

a. wanneer het lid de leeftijdsgrens zoals vermeld in artikel 4 lid 1 is gepasseerd, met ingang van het eerstvolgende boekjaar;
b. wanneer na herhaald verzoek de contributie niet betaald is.

Artikel 8

1. Ontzetting kan worden uitgesproken door de ledenvergadering, wanneer een lid in strijd met de statuten, reglementen of besluiten van de vereniging handelt of wanneer hij de vereniging op onredelijke wijze benadeelt. Indien een bestuurslid wordt ontzet, eindigt tevens diens bestuurslidmaatschap.
2. In afwachting van een beslissing tot ontzetting kan het bestuur een lid schorsen. Het lid kan zijn lidmaatschapsrechten dan niet uitoefenen; de plichten blijven onverminderd van kracht.
3. Een besluit tot ontzetting of schorsing dient met redenen te zijn omkleed en schriftelijk aan de betrokkene te worden meegedeeld. Er is geen beroep mogelijk.

Ledenvergaderingen

Artikel 9

De ledenvergadering is de hoogste instantie binnen de vereniging. Ledenvergaderingen worden onderscheiden in:

a. Jaarvergadering; het bestuur is verplicht deze binnen zes maanden na afloop van ieder boekjaar plaats te laten vinden. Tijdens deze vergadering dienen ten minste de volgende zaken te worden behandeld:
   1. de notulen van de vorige ledenvergadering;
   2. het jaarverslag van de secretaris;
   3. het jaarverslag van de penningmeester;
   4. het verslag van de kascommissie;
   5. de verkiezing van bestuursleden;
   6. de benoeming van de nieuwe kascommissie.
b. Gewone ledenvergadering; dit is elke andere ledenvergadering die door het bestuur bijeen wordt geroepen, wanneer het dit nodig of wenselijk acht.
c. Buitengewone ledenvergadering; Dit is elke ledenvergadering die bijeen wordt geroepen op een schriftelijk verzoek aan het bestuur van ten minste een zodanig aantal leden als bevoegd is tot het uitbrengen van een tiende gedeelte der stemmen in de ledenvergadering. Het

bestuur dient deze vergadering bijeen te roepen op een termijn van niet langer dan vier weken. Indien het bestuur hieraan binnen veertien dagen geen gevolg geeft kunnen de aanvragers zelf een buitengewone ledenvergadering bijeenroepen. De termijn genoemd in artikel 11 lid 1 van deze statuten is hier niet van toepassing.

Artikel 10

1. Een ledenvergadering is openbaar; de voorzitter van de vergadering kan ook niet-leden het woord geven. Alleen leden die hun contributie voor dat jaar voldaan hebben, hebben stemrecht.
2. Leden die verhinderd zijn de ledenvergadering bij te wonen kunnen een ander lid schriftelijk een volmacht verstrekken. Een lid kan door maximaal één lid gemachtigd worden. De voorzitter van de vergadering controleert de volmachten.

Artikel 11

1. De ledenvergadering kan geldige besluiten nemen indien uiterlijk twee weken van te voren de plaats, de datum en het tijdstip van de vergadering aan alle leden bekend zijn gemaakt.
2. Het bestuur of een groep van ten minste vijf leden kan de agenda vergezeld doen gaan van conceptbesluiten.

Artikel 12

De wijze van stemmen door de ledenvergadering is als volgt:

1. Elk lid heeft één stem.
2. Een besluit kan met gewone meerderheid van stemmen worden aangenomen, indien het een onderwerp betreft, dat in de agenda is aangekondigd, mits de agenda ten minste tien dagen voor de betreffende zitting aan alle leden is verzonden. In alle andere gevallen is een tweederde meerderheid van stemmen vereist.
3. Blanco stemmen en onthoudingen worden als geldige stemmen aangemerkt.
4. Een voorstel is verworpen bij stakende stemmen.
5. Op verzoek van een of meer aanwezige leden wordt er schriftelijk gestemd.

Artikel 13

De besluiten van de ledenvergadering worden door het bestuur zo spoedig mogelijk aan alle leden bekend gemaakt.

Bestuur

Artikel 14

1. Het bestuur bestaat uit ten minste drie personen. Het aantal bestuursleden wordt vastgesteld door de ledenvergadering.
2. De bestuursleden worden benoemd en ontslagen bij besluit van de ledenvergadering. De bestuursleden treden ieder jaar tijdens de jaarvergadering af, maar kunnen zich herkiesbaar stellen. Een bestuurslid kan te allen tijde ontslag nemen.
3. De voorzitter, de secretaris en de penningmeester worden allen in functie gekozen, waarbij maximaal twee van deze functies door één persoon mogen worden uitgeoefend. De taken van de overige bestuursleden kunnen door het bestuur naar believen worden vastgesteld.
4. Wanneer een bestuurslid tussentijds aftreedt, dan neemt een ander bestuurslid diens taak over. Een niet voltallig bestuur behoudt zijn bevoegdheden.
5. Ten minste de voorzitter en de penningmeester moeten wettelijk meerderjarig zijn. De overige bestuursleden dienen ten minste veertien jaar te zijn.
6. De Esperanto-kennis van elk bestuurslid dient voldoende te zijn om de betreffende bestuurstaak naar behoren uit te kunnen voeren.
7. Het bestuur is bevoegd de vereniging te vertegenwoordigen. De vereniging wordt voorts vertegenwoordigd door ieder wettelijk meerderjarig bestuurslid afzonderlijk.

Artikel 15

Het bestuur is over zijn handelen verantwoording verschuldigd aan de ledenvergadering.

Financiën

Artikel 16

1. Het boekjaar van de vereniging is gelijk aan het kalenderjaar.
2. De inkomsten van de vereniging bestaan uit:
   a. contributies van leden;
   b. jaarlijkse bijdragen van donateurs, abonnees en dergelijke;
   c. subsidies, schenkingen en andere incidentele inkomstenbronnen.
3. De jaarlijkse contributies voor leden worden vastgesteld door de ledenvergadering en gaan het daaropvolgende boekjaar in, mits het besluit minimaal vier maanden voor aanvang van dat jaar is genomen. Bij die vaststelling kan onderscheid worden gemaakt naar leeftijd of andere omstandigheden.
4. De vereniging kan giften weigeren.
5. Aanvaarding van legaten met een last behoeft instemming van de ledenvergadering.

Artikel 17

1. De penningmeester is verantwoordelijk voor het beheer van de financiën van de vereniging.
2. Over de bestemming van incidentele inkomstenbronnen van meer dan vijfentwintig maal het bedrag van de jaarlijkse contributie van een lid beslist de ledenvergadering.
3. Tijdens elke jaarvergadering benoemt de ledenvergadering een kascommissie, die bestaat uit ten minste twee leden zijnde geen bestuursleden. De commissie onderzoekt de financiën van de vereniging over het afgelopen boekjaar en brengt daarover tijdens de jaarvergadering verslag uit. Ieder jaar, tijdens de jaarvergadering treden de commissieleden af, maar zijn onmiddellijk herkiesbaar.

Statuten en reglementen

Artikel 18

De ledenvergadering kan reglementen vaststellen. Die mogen niet in strijd zijn met deze statuten.

Artikel 19

1. De ledenvergadering kan met tweederde meerderheid besluiten de statuten te wijzigen, wanneer:
   a. de voorgestelde wijzigingen ten minste een maand voor de betreffende vergadering schriftelijk aan alle leden bekend zijn gemaakt en ter inzage gelegd ten huize van de secretaris;
   b. ten minste een tiende deel van alle leden, eventueel bij volmacht, aanwezig is. Indien aan dit quorum niet voldaan wordt, kan een volgende ledenvergadering zonder quorum over de voorstellen een besluit nemen.
2. Wijzigingen in de statuten treden niet in werking dan nadat hiervan een notariële akte is opgemaakt.

Ontbinding

Artikel 20

1. De ledenvergadering kan met tweederde meerderheid besluiten tot ontbinding van de vereniging, wanneer:
   a. uiterlijk twee weken van tevoren de plaats, de datum, het tijdstip en de aard van het voorstel dat ter vergadering aan de orde is aan alle leden schriftelijk bekend is gemaakt en ter inzage gelegd ten huize van de secretaris; en
   b. ten minste drie vierde van alle leden, eventueel bij volmacht, aanwezig is. Indien aan dit quorum niet voldaan wordt, kan uiterlijk binnen twee maanden een nieuwe ledenvergadering bijeengeroepen worden waarin tot ontbinding kan worden besloten ongeacht het aantal aanwezige leden.

2. De laatste ledenvergadering beslist over de bestemming van het batig saldo na vereffening, zoveel mogelijk in overeenstemming met het doel van de vereniging.

Statuto

Nomo, sidejo kaj daŭro

Artikolo 1

1. La nomo de la asocio estas: « Nederlandse Esperanto-Jongeren », aŭ en Esperanto « Nederlanda Esperanto-Junularo », ambaŭ kaze mallongigebla al « NEJ ».
2. La asocio havas sian sidejon en Amsterdamo.
3. La asocio estas la nederlanda sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.
4. Origine la asocio fondiĝis je la 9a de januaro 1965 por la daŭro de 29 jaroj kaj 11 monatoj. Per aprobo de ĝia statuto per Reĝa Dekreto de la 9a de junio 1976, n-ro 58, la asocio estas agnoskita. Ekde validiĝo de ĉi tiu statutoŝanĝo la asocio estas formita por nelimigita tempodaŭro.
5. La oficialaj lingvoj de la asocio estas la internacia lingvo Esperanto kaj la nederlanda.

Celo kaj rimedoj

Artikolo 2

La asocio celas:

a. disvastigi Esperanton, speciale inter junuloj en Nederlando;
b. konsciigi junulojn en Nederlando pri la lingvaj problemoj en la mondo.

Artikolo 3

La asocio provas rajte atingi sian celon per:

a. organizado de renkontiĝoj por junaj nederlandaj kaj eksterlandaj Esperantistoj, kadre de socie kaj kulture interesaj temoj;
b. informado al la junuloj en Nederlando pri la lingvaj problemoj en la mondo kaj specife pri la ebloj de Esperanto kaj de la Esperanto-movado;
c. prizorgado de Esperanto-instruado;
d. kunlaborado kun aliaj Esperanto-organizoj, nacie kaj internacie;
e. kontaktado kun aliaj junularaj organizoj en Nederlando kun internacia agokampo;
f. eldonado de asocia gazeto;
g. apliko de ĉiuj aliaj efikaj rimedoj.

Membreco

Artikolo 4

1. Kiel membro de la asocio estas allasebla ĉiu kiu ankoraŭ ne atingis la aĝon de tridek jaroj kaj kiu anoncis sin ĉe la estraro aŭ ĉe de la estraro indikita persono por membriĝi.
2. Estraranoj kiuj havas tridek jarojn aŭ pli ankaŭ estas konsideritaj membroj.
3. Ĉe sinanonco kiel membro almenaŭ nomo, adreso kaj naskiĝdato estu menciataj.
4. Post la sinanonco la kandidato estu kiel eble plej baldaŭ informita de la estraro, aŭ nome de ĝi, ĉu li estas akceptita kiel membro. Se la kandidato estas akceptita li ricevas ekzempleron de la statuto kaj la regularoj. Se la kandidato ne estas akceptita, la membrokunsido povas ankoraŭ decidi akcepti lin.
5. La membrokunsido povas nomumi honorajn membrojn. Honora membro kiu transpasis la aĝlimon menciitan en artikolo 4 paragrafo 1 kaj kiu krome ne estas estrarano, ne havas voĉdonrajton.

Artikolo 5

La membroj submetas sin al la statuto, regularoj kaj decidoj de la asocio kaj estas devigataj pagi ĉiujaran kotizon.

Artikolo 6

1. La membreco finiĝas:
   a. pro morto;
   b. per skriba sciigo al la estraro pri la deziro fini la membrecon. Por tio ne estas tempolimo;
   c. per nuligo nome de la asocio. Por tio ankaŭ ne estas tempolimo;
   d. per eksigo.
2. Se la membreco finiĝas antaŭ la fino de la administra jaro, la kotiz-devo tamen restas valida por la tuta administra jaro.

Artikolo 7

Nuligo de la membreco nome de la asocio okazas skribe fare de la estraro en la sekvontaj kazoj:

a. se la membro transpasis la aĝlimon menciitan en artikolo 4 paragrafo 1, ekde la sekva administra jaro;
b. se post plurfoja peto ne pagiĝis la kotizo.

Artikolo 8

1. Eksigo povas okazi fare de la membrokunsido kiam membro agas kontraŭe al la statuto, regularoj aŭ decidoj de la asocio aŭ kiam li nepravigeble malutilas al la asocio. Ĉe eksigo de estrarano finiĝas samtempe ties estraraneco.
2. Atendante decidon pri eksigo, la estraro povas suspendi membron. La membro ne povas uzi siajn membrecajn rajtojn; la devoj plene pluvalidas.
3. Decido pri eksigo aŭ suspendo estu akompanata de klarigoj kaj skribe anoncata al la koncernato. Ne eblas apelacii.

Membrokunsidoj

Artikolo 9

La membrokunsido estas la plej alta instanco en la asocio. Ekzistas jenaj specoj de membrokunsidoj:

a. Jarkunsido; la estraro estas devigata kunvoki ĝin ene de ses monatoj post finiĝo de ĉiu administra jaro. Dum ĉi tiu kunsido estu pritraktataj almenaŭ jenaj aferoj:
   1. la protokolo de la antaŭa membrokunsido;
   2. la jarraporto de la sekretario;
   3. la jarraporto de la kasisto;
   4. la raporto de la kaskontrola komisiono;
   5. la elekto de estraranoj;
   6. la nomumo de la nova kaskontrola komisiono.
b. Ordinara membrokunsido; ĉi tio estas ĉiu alia membrokunsido kiun kunvokas la estraro, kiam ĝi opinias tion necesa aŭ dezirinda.
c. Eksterordinara membrokunsido; ĉi tio estas ĉiu membrokunsido kiu estas kunvokita laŭ skriba peto al la estraro de minimume tiom da membroj kiom havas dekonon de la validaj voĉoj en la membrokunsido. La estraro okazigu tiun kunsidon ene de kvar semajnoj. Se la estraro preterlasas kunvoki ĝin ene de dek kvar tagoj, la petantoj mem povas kunvoki eksterordinaran membrokunsidon. La periodo menciita en artikolo 11 paragrafo 1 de ĉi tiu statuto ne aplikiĝas ĉi tie.

Artikolo 10

1. Membrokunsido estas publika; la prezidanto de la kunsido povas doni la parolon ankaŭ al nemembroj. Nur membroj kiuj pagis la tiujaran kotizon, havas voĉdonrajton.
2. Membroj kiuj ne povas ĉeesti la membrokunsidon povas skribe rajtigi alian membron. Membro povas esti rajtigita de maksimume unu membro. La prezidanto de la kunsido kontrolas la rajtigilojn.

Artikolo 11

1. La membrokunsido povas fari validajn decidojn se plej laste du semajnojn antaŭe estas diskonigitaj la loko, la dato kaj la horo de la kunsido al ĉiuj membroj.

2. La estraro aŭ grupo de minimume kvin membroj povas akompanigi la tagordon per decidproponoj.

Artikolo 12

La membrokunsido voĉdonas laŭ jena maniero:

1. Ĉiu membro havas unu voĉon.
2. Ordinara plimulto decidas pri temoj anoncitaj en la tagordo, kondiĉe ke la tagordo minimume dek tagojn antaŭ la koncerna kunsido estas dissendita al ĉiuj membroj. Alikaze necesas plimulto de du trionoj.
3. Neŭtralaj voĉoj kaj sindetenoj estas konsiderataj validaj voĉoj.
4. Propono estas malakceptita ĉe voĉegaleco.
5. Laŭ peto de unu aŭ pli da ĉeestantaj membroj oni voĉdonas skribe.

Artikolo 13

La estraro kiel eble plej baldaŭ diskonigas la decidojn de la membrokunsido al ĉiuj membroj.

Estraro

Artikolo 14

1. La estraro konsistas el minimume tri homoj. La nombron de estraranoj fiksas la membrokunsido.
2. La estraranoj nomumiĝas kaj eksiĝas per decido de la membrokunsido. La estraranoj eksiĝas ĉiujare dum la jarkunsido, sed povas rekandidatigi sin. Ĉiutempe estrarano povas eksiĝi proprainiciate.
3. Elektiĝas prezidanto, sekretario kaj kasisto aparte, ĉe kio maksimume du el ĉi tiuj oficoj povas esti sub la respondeco de unu persono. La taskojn de la ceteraj estraranoj povas fiksi la estraro laŭ plaĉe.
4. Se estrarano intertempe eksiĝas, alia estrarano transprenas lian taskon. Neplennombra estraro tenas siajn kompetentecojn.
5. Almenaŭ la prezidanto kaj la kasisto estu majoritataj. La ceteraj estraranoj estu minimume dek-kvar-jaraj.
6. La Esperanto-kono de estrarano sufiĉu por povi kontentige plenumi la koncernan estraran funkcion.
7. La estraro povas reprezenti la asocion. Krome, ĉiu majoritata estrarano aparte povas reprezenti la asocion.

Artikolo 15

Pri sia agado la estraro respondecas al la membrokunsido.

Financoj

Artikolo 16

1. La administra jaro de la asocio estas la kalendara jaro.
2. La enspezoj de la asocio konsistas el
   a. kotizoj de membroj;
   b. jaraj kontribuoj de donacantoj, abonantoj, kaj similaj;
   c. subvencioj, donacoj kaj aliaj neregulaj enspezoj.
3. La jaraj membrokotizoj estas fiksitaj de la membrokunsido kaj ili validas ekde la sekva administra jaro, kondiĉ e ke oni decidis pri tio minimume kvar monatojn antaŭ la komenco de tiu jaro. Ĉe tiu fikso oni povas distingi laŭ aĝo aŭ laŭ aliaj cirkonstancoj.
4. La asocio povas rifuzi donacojn.
5. Akcepto de ŝarĝitaj legacoj bezonas aprobon de la membrokunsido.

Artikolo 17

1. La kasisto respondecas pri la administrado de la asociaj financoj.
2. Pri la destino de neregulaj enspezoj de pli ol la dudek-kvin-oblo de la jara membrokotizo decidu la membrokunsido.
3. En ĉiu jarkunsido la membrokunsido nomumas kaskontrolan komisionon, kiu konsistu el minimume du membroj kiuj ne estas estraranoj. La komisiono esploras la financojn de la asocio pri la pasinta administra jaro kaj raportas pri tio en la jarkunsido. Ĉiujare en la jarkunsido eksiĝas la komisionanoj, sed estas tuj reelekteblaj.

Statuto kaj regularoj

Artikolo 18

La membrokunsido povas fiksi regularojn. Tiuj ne rajtas kontraŭi ĉi tiun statuton.

Artikolo 19

1. La membrokunsido povas per du-triona plimulto decidi ŝanĝi la statuton se:
   a. la proponitaj ŝanĝoj estas skribe diskonigitaj al ĉiuj membroj minimume unu monaton antaŭ la koncerna kunsido kaj konsulteblaj ĉe la sekretario;
   b. minimume unu dekono el ĉiuj membroj, eventuale per rajtigo, ĉeestas. Se tiu kvorumo ne estas atingita, sekva membrokunsido povas decidi pri la proponoj sen kvorumo.
2. Statutŝanĝoj ekvalidas nur post registro de notaria akto pri ili.

Malfondo

Artikolo 20

1. La membrokunsido povas per plimulto de du trionoj decidi malfondi la asocion, se:
   a. la loko, la dato, la horo kaj la celo (malfondo) de la kunsido estas skribe diskonigitaj al ĉiuj membroj minimume du semajnojn antaŭ e kaj konsulteblaj ĉe la sekretario; kaj
   b. minimume tri kvaronoj el ĉiuj membroj, eventuale per rajtigo, ĉeestas. Se tiu kvorumo ne estas atingita, nova kunsido povas esti kunvokata ene de du monatoj, en kiu oni povas decidi malfondi senkonsidere la nombron da ĉeestantaj membroj.
2. La lasta membrokunsido decidas pri la destino de la maldeficito post kvitigo, kiom eble plej konforme al la celo de la asocio.

Ĝenerala Regularo

Lastaj ŝanĝoj aprobitaj en aprilo 1996.

Lingvo

Artikolo 1

Ĉiuj oficialaj dokumentoj de la asocio estas almenaŭ en Esperanto. Oficialaj dokumentoj estas protokoloj de membrokunsidoj kaj estrarkunsidoj, estraraj jarraportoj kaj la raporto de la kaskontrola komisiono.

Ligitoj

Artikolo 2

NEJ konas jenajn kategoriojn de ligitoj:

a. membroj, ĉe kiuj oni distingas inter
   1. ordinaraj membroj (OM),
   2. junaj membroj (JM), kiuj havas malpli ol dek naŭ jarojn, kaj
   3. honoraj membroj (HM);
b. donacantoj;
c. abonantoj; kaj
d. simpatiantaj membroj.

Artikolo 3

1. Ordinara membro kaj juna membro ricevas la oficialan gazeton de la asocio *Jongeren Esperanto Nieuws* (*Jen*) kaj la gazeton *Koncize*. Honora membro ricevas la gazetojn *Jen* kaj *Koncize* laŭ peto.
2. Donacanto kiu pagas minimume tiom kiom estas la kotizo por ordinara membro, ricevas la gazeton *Jen*.
3. Abonanto ricevas la gazeton *Jen*.
4. Simpatianta membro aĝas malpli ol 30 jaroj, skribe esprimas sian subtenon al NEJ, rajtas je unu senpaga *Jen*, kaj ne pagas kotizon.

Sekcioj

Artikolo 4

1. La estraro povas laŭ propono de minimume kvin membroj decidi pri fondo de sekcio de NEJ. La sekcio estas memstara rilate la internan organizadon, funkciadon kaj financojn, konsiderante la statutan celon de NEJ. NEJ-sekcion povas eksigi la sekcio mem aŭ la estraro.
2. Pri sia agado la sekcio respondecas al la estraro. Por la jarraportoj de NEJ sekcio ĉiujare raportu al la estraro pri sia agado.

Rilatoj kun aliaj organizoj

Artikolo 5

1. Laŭ decido de la membrokunsido NEJ povas membriĝi aŭ reprezentiĝi ĉe aliaj organizoj.
2. Krom nederlanda sekcio de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), NEJ estas
   a. reprezentata ĉe Stichting Esperanto bij het Onderwijs (Fondaĵo Esperanto ĉe la Instruado, EĉlI); kaj
   b. membro de Nederlands Comité voor Multilateraal Jongerenwerk (Nederlanda Komitato por Internacia Junullaboro, '31).
3. Reprezentanton de NEJ ĉe alia organizo nomumas kaj eksigas la membrokunsido dum la jarkunsido. Reprezentanto raportas al la estraro.

Komisiitoj

Artikolo 6

1. La estraro povas asistigi en siaj aktivaĵoj redakcion, komisionojn, laborgrupojn, individuajn funkciulojn kaj similajn. Ili nomiĝas komisiitoj.
2. La estraro nomumas kaj eksigas komisiitojn.
3. Komisiito regule informas la estraron pri sia agado per transdono de rezultoj, protokoloj aŭ decidaroj.
4. Pri sia agado komisiito respondecas al la estraro.
5. La kasisto de NEJ respondecas pri la financoj de la komisiitoj.
6. Komisiito arĥivigas la materialon rilate sian agadon, kiu povas esti interesa por posteuloj.

Gazetoj kaj redakcio

Artikolo 7

1. La oficiala gazeto de NEJ nomiĝas *Jongeren Esperanto Nieuws*, mallonge *Jen*.
2. NEJ havas sian oficialan gazeton kune kun la Flandra Esperantista Junulara Organizo (FLEJA).
3. La gazeto estas parte nederlandlingva, parte esperantlingva.

Artikolo 8

1. La redakcio libere decidas pri aperigo kaj ŝanĝo de artikoloj, escepte en la kazoj de kontribuoj kies aperigon regulas la statuto kaj de oficialaj sciigoj de la estraro.
2. La redakcio speciale atentas la lingvan ĝustecon de kontribuoj en Esperanto.

Artikolo 9

NEJ kuneldonas la komunan gazeton de eŭropaj junularaj Esperanto-asocioj *Koncize*.

Komisiono pri renkontiĝoj

Artikolo 10

La Komisiono Pri Renkontiĝoj (KPR) prizorgas la organizadon de renkontiĝoj de NEJ, eventuale kunlabore kun aliaj organizoj aŭ personoj.

Artikolo 11

La renkontiĝoj celas ebligi al la membroj de NEJ:

a. renkonti aliajn junajn esperantistojn;
b. interparoli kaj diskuti pri aktualaj temoj rilate socion kaj kulturon;
c. (plu)lerni Esperanton kaj konatiĝi kun ĝia kulturo;
ĉ. (plu)informiĝi pri lingvaj problemoj.

Informa servo

Artikolo 12

La Informa Servo prizorgas la informadon pri Esperanto kaj pri NEJ, speciale al junuloj. Ĝia laboro konsistas el

a. preparado de flugfolioj, afiŝoj, budmaterialoj, kaj similaj;
b. prizorgado de laborgrupoj, provlecionoj kaj prelegoj kaj similaj, speciale por junularaj asocioj kaj grupoj kun internacia agokampo.

Artikolo 13

La Informa Servo prizorgas informkunvenojn kaj kursojn por la membroj de NEJ por transdoni spertojn pri la informlaboro.

Komisiono Financa

Artikolo 14

La Komisiono Financa (KoFi) klopodas pligrandigi la financajn eblojn de NEJ. Ĝia laboro konsistas el

a. konsilado al aliaj komisiitoj pri eblecoj por peti subvenciojn favore al ilia agado;
b. traktado de subvencipetoj de NEJ al aliaj instancoj;
c. varbado de komercaj anoncoj en *Jen*.

Arĥivo

Artikolo 15

La estraro respondecas pri la prizorgado de la arĥivo de NEJ.

Financa Regularo

Aprobita en la membrokunveno de 31-3-1997.

Artikolo 1 Celo

a. Tiu ĉi regularo celas fiksi regulojn pri (i.) kompenso de kostoj kiujn aktivuloj faras por agadoj de NEJ, kaj (ii.) pri aliaj gravaj financaj temoj kiuj ne estas menciitaj en la Statuto nek en la Ĝenerala Regularo.
b. Estas la kasisto de NEJ kiu evaluas petojn pri monristorno kaj agadajn buĝetojn. La kasisto aplikas tiun ĉi regularon, kaj rajtas nur devii de ĝi, se la estraro aŭ la membrokunveno konsentas.

Artikolo 2 Ĝeneralaj reguloj

La sekvontaj ĝeneralaj reguloj aplikiĝas ĉe agadoj komisiitaj de la estraro aŭ de la membrokunveno:

a. Vojaĝkostoj kompenseblas surbaze de la realaj kostoj ĝis maksimume la tarifoj de publika transporto duaklasa.
b. Sen pruviloj (trajnbiletoj, kuponoj k.s.) elspezoj ne kompenseblas, sed ĉe malaltaj kostoj de telefonado, kopiadoj kaj afrankoj ne necesas pruviloj.
c. La kasisto rajtas rifuzi kompenson de grandaj elspezoj, se ne estas ŝlia aprobo antaŭ la planota elspezo.
ĉ. Elspezoj estas fakturataj per elspezolistoj, haveblaj ĉe la kasisto.
d. Por hejme akceptita kunsido de estraro aŭ komisiono, elspezinto/gastiginto rajtas peti ristornon ĝis maksimume 10 guldenojn por kafo, kukoj k.s.
e. Koncerne elspezojn por internaciaj vojaĝoj elspezonto interkonsentu kun la kasisto pri kompenseblaj kostoj.
f. Kostoj kiuj ne estas fakturitaj antaŭ unu monato post la fino de la kalendara jaro, estas ne plu kompenseblaj.
g. Ĉiu kiu ricevas monon por NEJ, transdonas ĝin al NEJ en la limtempo de unu monato post ricevo.

Artikolo 3 KPR

a. KPR-anoj rajtas peti ristornon de la duono de vojaĝkostoj faritaj por vojaĝi al mem organizita renkontiĝo kaj por revojaĝi hejmen.

b. Aliaj kostoj de la KPR-anoj kompenseblas laŭ la reguloj menciitaj en artikolo 2.
c. KPR-anoj rajtas pagi nur parte la kotizon de la mem organizita renkontiĝo. Ili plene pagu la kostojn por tranokti kaj manĝi.
ĉ. La KPR faras buĝeton por renkontiĝo organizota de ili kaj prezentos ĝin por aprobo al la kasisto almenaŭ tri monatojn antaŭ la renkontiĝo.
d. Oni pensu almenaŭ pri la sekvontaj kostoj ĉe la buĝetado por renkontiĝo:
   — rilate al la ejo: luprezo, gaso, akvo kaj elektro, purigado de la ejo, turisma imposto;
   — rilate al la programo: vojaĝkostoj de prelegantoj, donacoj al prelegantoj, enirprezoj, trinkaĵoj en trinkejo, vojaĝkostoj de partoprenantoj;
   — rilate al la varbado: kompilad-, kopi- kaj sendokostoj por la unua kaj dua informilo, kostoj por informi gazetojn, radiostacion, k.s.;
   — neantaŭvidataj elspezoj (proksimume 10% de la plena buĝeto);
   — bankkostoj de internacia pago.
e. Deficitoj de la KPR estas kompletigataj de NEJ, kondiĉe ke estas aprobita buĝeto de la kasisto.

Artikolo 4 Kursoj

a. Jenaj reguloj validas por kursgvidantoj:
   — iliaj elspezoj por manĝaĵoj ne kompenseblas;
   — iliaj tranoktkostoj kompenseblas;
   — iliaj vojaĝkostoj kompenseblas laŭ la reguloj menciitaj en artikolo 2;
   — la kasisto fiksas la maksimuman sumon elspezotan por kursmaterialo post interkonsento kun la kursgvidanto(j).
b. Kurso organizita nome de NEJ nur povas okazi, se la kasisto aprobas la buĝeton de tio.
c. En buĝeto porkursa oni konsideru kostojn por:
   — kursmaterialo, inkluzive tiu por la kursgvidanto(j),
   — manĝaĵoj kaj trinkaĵoj de kursanoj,
   — vojaĝo de la kursgvidanto(j),
   — donaco por la kursgvidanto(j),
   — varbado,
   — kompilado, kopiado kaj sendado de informiloj,
   — neantaŭvidataj elspezoj (proksimume 10% de la buĝeto).

Artikolo 5 Budoj

a. Maksimume kvar homoj kiuj okupiĝis budon por NEJ, rajtas fakturi vojaĝkoston al NEJ, maksimume po 45 guldenojn.
b. NEJ nur povas ĉeesti pagendan budon, se la kasisto antaŭe aprobas tion.

Artikolo 6 Jen

La estraro de NEJ, kune kun la redakcianoj de *Jen* kaj kune kun la estraro de FLEJA, elektas presiston kaj fiksas kun ŝli kontrakton por la presado de *Jen*.